

*Antaŭen por
realigi la Zamenhofan revon!*



Zamenhof-tago 2015

Torino, Italio, 12 decembro 2015

Prelego de Stefano Keller, Estrarano de UEA

(<http://goo.gl/F4n3tP>)

Zamenhof-tago - Esperanta Librotago



La **Zamenhof-tago** (15-a de decembro) estas la naskiĝtago de L. L. Zamenhof (1859-1917), la iniciatinto de Esperanto, unu el la plej vaste celebrataj festotagoj en la Esperanto-kulturo.


Laŭ propono de unu el niaj signifaj verkistoj, Julio Baghy, ni festas tiam ankaŭ la *Esperantan kulturon*. Por la plialtigo de la spirita nivelo de la esperantistaro, Baghy sugestis (en sia ‘Publika letero’⁽¹⁾, 1931), ke la *Zamenhof-tago* estu ankaŭ la tago de la **Esperanta libro**.



Zamenhof-tago 2015



La *Zamenhof-tago* aŭ *Esperanta Librotago* estas nia kultura evento, kiel tiu ĉi en Torino, kiam – krom rememoro pri la verkinto de la Internacia Lingvo – ni studas aŭ aŭskultas, ĝuas *esperanto-kulturaĵon*. Tiel ni ne nur kleriĝas pri nia kulturo interetna, sed ankaŭ igas nin pli kompetentaj por informi ne-esperantistojn pri la internacia lingvo, ties abunda literaturo originala kaj tradukita. Ni pli profunde konsciiĝas pri la fakto, kiel nia movado disvastigas kulturverkojn de diversaj etnoj, ebligante ties ĝuadon al alilingvanoj, aliaj popoloj.




Ludoviko Lazaro Zamenhof: *Esperanto*

En Bulonjo ĉe maro (Boulogne sur mer), dum la Unua Kongreso Esperantista, la 5an de aŭgusto 1905 (18 jarojn post apero de Esperanto), Zamenhof substrekas⁽²⁾ tion, kion ni ekde tiam klopodas pruvi:

«... montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. ... ke reciproka kompreniĝado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligu aŭ englutu alian, ...»

kaj li aldonas ke jam grandas, vastas nia literaturo, multas niaj gazetoj, kluboj, grupoj tutmonde, kaj

«al neniuj kleruloj tutmonde la nomo de nia afero nun estas jam nekonata.»




Ludoviko Lazaro Zamenhof: *Esperantismo - Esperantisto* - Difinoj -

Deklaracio pri la esenco de la **Esperantismo** ⁽³⁾,
Bulonjo-ê-Mar, la 9-an de Aŭgusto 1905

«... *esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas.*»

Zamenhof klarigas pri tio en la Dua Kongreso Esperantista, en Ĝenevo (la 28-an de aŭgusto 1906), ke oni povas kaj rajtas nomi ‘esperantisto’ ne nur la revanton pri unuigo de la homaro (per Esperanto), sed ankaŭ tiujn, kiuj uzas Esperanton por mongajno, amuziĝo, eĉ tiun, kiu uzas Esperanton por celoj malnoblaj kaj hommalamaj.

Li tie tamen aldonas: «*krom la praktika flanko, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean.*»




Ludoviko Lazaro Zamenhof: *Esperantismo* *kaj la interna ideo*

En Ĝenevo, Zamenhof distanciĝis de la nura praktika esperantismo:

- «*Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan.*»


- «*Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo - vi ĉiuj sentas ĝin tre bone - estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.*» (4)



Ludoviko Lazaro Zamenhof *Esperantismo kaj* *la interna ideo: homaranismo*

Zamenhof klarigis pri tio, ke la esperantismo estas portanto de mesaĝo. Sed en 1906, dum sia kongresa parolado en Ĝenevo, li ne povis diskonigi sian traktaton pri Homaranismo, kiu en 12 punktoj ('dogmoj') priskribas interalie homfratecon, landojn, lingvojn, patrujon, nacion, religion, morojn – el vidpunktoj neŭtrale homa, genta, regna:

- «*La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la homaranismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sektion.*»
- «*Kiam oni min demandas, kiu mi estas, kiaj estas miaj naciaj konvinkoj, religiaj principoj, mia celado kaj idealoj, mi respondas: "Mi estas homarano". Tio ĉi signifas, ke mi estas homo, kiu sin gvidas per la sekvantaj dogmoj: ...*» (5)



Ludoviko Lazaro Zamenhof: **Enkonduko de Esperanto** ĉu ‘desuprisme’ aŭ ‘desubisme’?

En la Sesa Kongreso Esperantista, Vaŝingtono, la 15-an de aŭgusto 1910, Zamenhof diris pri la eblaj alirvojoj por enkonduki Esperanton:

«La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj: aŭ per laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta.»⁽⁶⁾

En la Oka Kongreso Esperantista, Krakovo, la 11-an de aŭgusto 1912, Zamenhof faris gravan rimarkon, daŭre validan:

«Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon pri ĝi.»⁽⁷⁾



Esperanto

*“Esperantistoj kaj homaranoj”
kaj la movado hodiaŭ*

Kiu faru kion, kie, ...?



Movad-nivele: UEA – Estraro - CO – Landaj Asocioj

Lokanivele: Landaj Asocioj – Lokaj grupoj – Individuoj

Eksteraj rilatoj: Unesko-komisionoj – UN-asocioj ⁽⁸⁾


Kulturaj kaj similcelaj asocioj lokaj

“Esperantistoj kaj homaranoj” *lingvolernado, kultura kleriĝo*

«*Kial la Esperanto-Movado bezonas altan kulturen nivelon?*»

Ĉar esperantismo, kiel lingvomovado, havas esence kulturen karakteron. Altigante la kulturen nivelon de la Movado, ni kreas la kondiĉojn, en kiuj ni regajnas al niaj celoj la simpation de la intelektularo. Sen ili Esperanto ne havas esperon venki sian batalon. Tiu simpatio penetros ĉiujn tavolojn de la publika opinio, ĝis kiam la registaroj estos devigataj agnoski la Internacian Lingvon kiel fakton.» [\(9\)](#)

*Zamenhof kaj la Movado - de Gian Carlo Fighiera el
“Paŝoj al Plena Posedo” de William Auld.*



“Esperantistoj kaj homaranoj” *lingvolernado, kultura kleriĝo*

Nia Zamenhof-tago estu kontribuo al justa kaj egalrajteca komunikado, respektanta lingvan, kulturan diversecojn, strebe al daŭripova konservado de tiuj riĉecoj kaj rajtoj.

Tiutage ni celebru la Esperanto-literaturon ankaŭ per aĉeto, eklego aŭ finlego de nova libro! (10)



*Antaŭen por realigi la
Zamenhofan revon!*
Zamenhof-tago 2015





*Antaŭen por realigi la
Zamenhofan revon!*

Agu vialingve!

Zamenhof-tago 2015

Esperanto
Giornata del
libro



Esperanto
Giurnêda de
Libar



Esperanto
Die di su Libru



Esperanto
Jurnata di lu
Libbru



Ni bezonas tutmonde
la ekziston kaj kunlaboron

- **kaj** de **esperanto-parolantoj**,
esperanto-uzantoj, alinome:
‘Esperantistoj’,
- **kaj** de ‘Homaranoj’,

por realigi la Zamenhofan revon,
... nian revon!

Torino, 2015 decembro 12,
Zamenhof-festo 2015



Dankon por via atento!
Stefano Keller,
Estrarano de UEA
(eksteraj rilatoj)



Bibliografio, referencoj:

- (1) Baghy, Julio: Publika letero pri la reorganizado. Memorando al la Esperantistaro kaj al ĝiaj gvidantoj. Budapeŝto, Hungarlanda Esperanto-Societo, 1931. [\(reen al la paĝo 2\)](#)
- (2) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.9, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 4\)](#)
- (3) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.113-115, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 5\)](#)
- (4) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.24-25, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 6\)](#)
- (5) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.116-127, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 7\)](#)
- (6) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.69, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 8\)](#)
- (7) Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof, p.94, Japania Esperanta Librokooperativo, 1997. [\(reen al la paĝo 8\)](#)
- (8) <http://www.linguistic-rights.org/uea/mondaevoluo.html> [\(reen al la paĝo 9\)](#)
- (9) Zamenhof kaj la Movado, Gian Carlo Fighiera, en “Paŝoj al Plena Posedo”, William Auld, 1974, Paŝo dektria, p.88-97. [\(reen al la paĝo 10\)](#)
- (10) <http://www.linguistic-rights.org/stefano-keller/ZT2015SK.pdf>
[\(reen al la paĝo 11\)](#)



Kopirajto © Stefano Keller, 2015

Reta adreso de tiu ĉi PDF: <http://goo.gl/F4n3tP>